

EBEN-EZER...

...HELPA
ŠTONO



EBEN - EZER

helpa štono

EBEN-EZER...

...helpa ŝtono

Antaŭlonge, en Israelo, antaŭ ĝuste 3000 jaroj, la profeto Samuel starigis altan ŝtonon por memorfesti gravan liberigon. Eben-Ezer signifas "helpa ŝtono". Estis, tiam, limŝtono inter la sklavaj tempoj kaj la restariĝaj tempoj.

Hodiaŭ, kiel antaŭlonge, **Eben-Ezer** estas limŝtono. Ĝi stariĝas por rememorigi al la homoj la liberigon kiu devas okazi. Nia Eben-Ezer tiel estas, kontraŭe, ankoraŭ pli esperiga ago ol memoriga. Ĝi estas limŝtono en la tempo, sed ankaŭ limŝtono en la spaco. Ĝi situas ĉe krucvojo strategia, kie Belgio, Germanio kaj Nederlando apudestas pere de siaj ĉefaj alirvojoj.

Tie, en tiuj antaŭdestinitaj lokoj, pasis ĉiuj armeoj de la Historio, flirtis ĉiuj militaj flagoj, resonis la klaktintadoj de armiloj kaj la tondroj de kanonoj, brulis la vilaĝoj kaj la rikoltoj.

La armeoj de Julio Cezaro, de la Frankaj reĝoj, de la feŭdaj nobeloj, de la Hispanaj reĝoj, de la Francaj reĝoj, de la princoj kaj de la imperiestroj, invadis la suprajn vojojn, starigis siajn kampadejojn, alportis ruinigon kaj teruron.

En 1914-a, la 4-an de aŭgusto, la armeoj de "Kaiser" transiris la Mozon, je ses kilometroj de ĉi-tie; en 1940-a, la 10-an de majo, la armeoj de Hitler transiris la Alberto-kanalon, je 4 kilometroj de ĉi-tie kaj perforte ekokupis la fortikaĵon de Eben-Emael. La trupoj de Nato (Otan) nun okupas la regionon.

Sur la batalkampoj ĉiutempaj, Eben-Ezer estas limŝtono, la limŝtono de Paco.

Eben-Ezer estas fortikaĵo

Ĝi estas la bastiono de la Espero, la Bastilo de la Pacifistoj. Staranta kiel lumturo supre de du valoj, ĝi estas kiel ŝankro meze de militaj deponejoj de Nato (Otan), kiuj profanas la regionon, tri mejlojn en la ĉirkaŭaĵo.

En la Malalta-Mozo kaj la valo de la Geer rivero, la "strategoj" neniam plibonigeblaj, akumulis nun kazernojn, radar-instalaĵojn surtere kaj subtere, karburajo - rezervujojn, rifuĝejojn fortikigitajn por staboj, sekretajn bazojn, kun la tuta tekniko kaj la tuta aĉaĵo sufiĉa por fajrigi, per nura flamo, la tutan valon de Geer, de Tongres al Maastricht okaze de konflikto.

Si ni aldonas, ke la kluzoj de Lanaye, la pontoj de Alberto-kanalo, la pasejoj de la Mozo, la ĉefaj autovojoj kaj ĉiuj strategiaj vojoj tradiciaj kruciĝas en niaj lokoj, ni ne troigas dirante, ke ni estas en la centro de la ĉefaj celtabuloj preparitaj de Nato (Otan).

Meze de ĉio-tio, meze de tiu fantasmagoria amasbuĉa ludo, starigante siajn turojn al la suno aŭ sub la luno, Eben-Ezer priridas tiujn, kiuj preparas la militon ĉar ili timas la pacon. Plie, ĝi denuncas la hipokritecon de la nerespondeculoj, kiuj por savi klasajn interesojn, ellaboras totalan inferon, per senmalicaj formuloj kaj per trompemaj esprimoj. Ĝi akuzas tiujn diablajn fiservantojn, kiuj sub la aspekto de ŝtatestroj, revigligis la fajron de pluraj krateroj estingitaj kaj kiuj febre preparas trian kekatombon, malantaŭ la ekranegoj de la demokratio.

Kiel celado direktata al ilia putraĵo, je la limoj de la milito kaj de la Paco, Eben-Ezer ilin alfrontas.

Ĝi apogas sin sur la forteco de la aĵoj, tiu mistera forteco, kiu balais ĉiujn tiranojn spite de ilia groteska detruiga povo. Jes, Eben-Ezer estas fortreso iom mistera, sed, kiu scias ...?, kiu certe samvaloras aliajn. La Keruboj de la espero staras supre de la turoj kiel gardostarantoj prizorgante por la Homaro sur la Tera kampo.

Eben-Ezer estas templo

La templo de la Paco.

Paŭlo rompita estas enmasonigita parte en la sojlo; alia supre. La rajtoj kaj devoj de la homo estas gravuritaj, enireje, kiel du grandegaj tabeloj de la leĝo. Interne, oni vidas ke la tuta konstruaĵo estas subtenata de la Kerubaj flugiloj. La muroj estas kvazaŭ Historiaj paĝoj. Malantaŭe, supreniras la Besto de l'Apokalipso, sur la vojo de ĉiuj militoj, ĝi staras antaŭ Libro. Malantaŭ ĝi, vertikale disvolviĝas malfermita libro de la eterneco; estas la "malbona novaĵo", kie 4000 jaroj da amasbuĉadoj, da militoj kaj da

persekutoj estas skribitaj sur pergameno kvar metrojn alta, najlita kaj krucumita.

Antaŭ la besto estas la "bona novaĵo" sub la formo de libro vastega, luma kaj protekta, kiu malfermiĝas al amo kaj saĝeco de la homoj. La libro sangas pro siaj vundoj, kiuj estas tiuj de la Homaro, kaj la homa mieno atentigas pri tiuj vortoj: "Vi amos vian proksimulon kiel vin mem". Sur la muroj, ĉirkaŭe pendas, kiel ŝildo, la paneloj kaj skribaĵoj portitaj dum multaj demonstracioj kaj manifestacioj pacifistaj. Tutsupre de la templo-turoj, la kvar Keruboj staras. Unu el ili, la flugilhava leono, staranta al la ĉielo, rigardas en la direkto de Oriento por saluti la aŭronon de granda Paco-tago.

Eben-Ezer estas demonstracio

Ĉar pacifismo estas senperforta, oni akuzas ĝin esti "pacifismo blekanta". Nu, perforto ne estas kuraĝo kaj bruteco ne estas forteco.

Ĉi-tie, oni pruvas, de la fondo de la galerioj ĝis la supro de la skafaldoj, ke la pacifistoj kapablas ne nur labori, sed ankaŭ bone labori.

Per brakoj honestaj, sen helpmono, sen kuraĝigoj kaj spite ĉiuspecajn kontraŭstarojn, la konstruaĵo, tagon post tago, stariĝas kiel la plej bela ornamo de la Geer valo. Ĝi instaliĝas en la imagojn kaj en konversaciojn trans la landlimoj. Supermezura kaj bone proporciigita, ĝi premeblas la spektanton kiu plene admiras ĝin, ĝuste la kontraŭo de tio, kion oni spertas antaŭ la pretendemaj mort-monumentoj, kie sento malsaneca kaj malvarmega vin penetras.

Estas, ĉi-tie, demonstracio evidenta de la libereco pensi, labori, protesti, daŭrigi inteligentan revolucion malgraŭ la ŝtato kaj ofte kontraŭ ĝi.

Eben-Ezer estas lernejo

Estas la Siliko-Muzeo. Siliko estas vivanta ŝtono: ĉu tio ne estas signifoplena ke la templo de la Paco estas, per ĝi, konstruita? Siliko neniam estis uzata por konstrui palacojn, nek malliberejojn, nek fortikaĵojn.

Siliko estas ŝtono iom filozofeca:

Ĝi korplene eniĝas en la geologiaj tavoloj.

Ĝi konservas kaj rivelas grandan parton de paleontologio.

Ankoraŭ pli, tiu ŝtono estas la fundamento de arkeologio kaj la multvalora ŝlosilo de la tuta homa industrio. Nia lernejo estas la Revolucio, ankoraŭ pli ol la Evoluado. La multaj aĵoj geologiaj, paleontologiaj, arkeologiaj restarigas la subjekton en sia medio, en sia etoso, sen etiketo, en la kunteksto de la vivo eterna kaj universala. La grundoj esplorfosindaj kaj observadindaj situas proksime. La teorioj ne utilas, kaj multkaze, ni ekde nulo rekomencas. Niaj eltrovoj, en tiuj fakoj, grandvaloras.

Sed la paleontologio, prifosilia scienco, ne estus kompleta se oni ne studus, krome, ankaŭ la konduton de la aktualaj fosilioj. Kelkaj el ili estas tre timindaj. Cetere, ni supre starigis kelkajn el ili kiel gargojlojn.

Multaj aliaj temoj estas pritraktataj en Eben-Ezer kaj ne ĉiam laŭ la humora vidpunkto. Tie profiliĝas ĉiuj paŝoj de la Historio, la Homa Historio, kaj estas tempo pri ĝi memori.

Eben-Ezer estas arto

Kiu ajn rigardas ĝin, diras: Kiel bela! Tamen, tiu artaĵo kopias neniun alian. Ĝi estas homa monumento eligita iom post iom el la tero, sen tajlado, kruda kaj prilaborita, kiel grandega monolito. Sen esti de iu ajn epoko, ĝi ŝajnas aparteni al ĉiuj epokoj kaj al ĉiuj animaspiroj. Beleco tie esprimiĝas en la sino de la naturo, ekde aŭroro ĝis krepusko. En plena suno aŭ sub la blaŭa lunheleco, ĉiam per novaj vortoj, la ŝtonoj parolas. La homa ardeco kaj la tera preĝo kunkune svingiĝas en giganta poemo.

Eben-Ezer, kiel nova Akropolo, akcentas la belecon, la pacon, la poezion, sen trudoj. Arto estas efika armilo por la pacifistoj. Per arto oni povas plej bone atingi la veron kaj mallaŭdi la stultecon.

La arto naskiĝis kun la penso. La unuaj homoj estis kneditaj el arto kaj poezio. Redoni al la homo beleco-bezonon, estas redoni al ĝi la duonon de ĝia naturo. Ekzalta revolucio estas ankaŭ redoni la simplecon al arto, en jarcento, kiam oni ĝin per dolaroj kalkulas.

Arto estas aŭdaco kaj relevacio. Necesas iri al ĝia konkero por iam malkovri, ke la plej granda arto estas la vivo-arto.

Ĉu la kvar keruboj de l'apokalipso ne estas aŭdaca kulmino, kaj por la arto kaj por la pensado, kulmino kaj saltotabulo ? Per mirakla ekvilibro, ili rezistas al ventoj kaj al la ŝtornoj, stabilaĵ inter la nestabilaĵ fortoj, rompiĝemaj pro ĉiuj siaj riskoj, sed fortaj pro sia destino.

Estas Homara bildo tra la Historio-uraganoj.

Feliĉa tiu, kiu, sur iliaj flugiloj, faros belan vojaĝon.

Eben-Ezer estas profetaĵo

"Mi rompos en la lando, la arkon, la spadon kaj la militon".

Eben-Ezer estas reliefa bildo de apokalipso; ĝi estas starigita kvazaŭ per rekto-ŝnuro de la profetoj. Sur ĝia flago estas skribita la profetaĵo de Jesaja: "Nacio ne plu elingiĝos la galvon kontraŭ alian kaj oni ne plu instruos la militon."


La turo atingis sian altecon en la jaro 1964-a, dato kiu estas la 6.000-a jaro de post Adamo, la 2500-a de post Ciro kaj la finatingo de du profetaĵoj de Danielo. Eben-Ezer proklamas pacon kiel dekretan de tiuj, kiuj prizorgas. Ĝi inaŭguras novan jarmilon.

Konstruita laŭ skalo de la apokalipsa Jerusalemo, ĝi estas fatala signilo. La ĉiamaj profetoj, la orakloj de ĉiuj popoloj predikis pacon kaj restariĝan eraon, kiu postvenos la ferepokon, al infero de la militoj. Por Eben-Ezer, la tempo venis.

Certe, la tenebroj ankoraŭ ekzistas, sed malgraŭ ĉio, kiel la kokokrio, kiu matenon, el la sino de la minaco, Eben-Ezer proklamas la pacon.

Je la Eben-Ezera lernejo, la profetaĵo estas: esplorenda historio scienco, revelacienda enigmo kaj elpensendaj novaj leĝoj. La tago estas proksima, kiam la lastaj spasmoj de la Stulteco finiĝos. Baldaŭ la parolo de la dioj, la oraklo de la profetoj kaj la idealo de porpacaj homoj plenumiĝos.

Tial, ĉiu bonkora homo devas antaŭeniri, altkape, ĉiam pli aŭdace, ĝis venos la Paco, la paco sen "venko", konkludo de ĉiuj venkoj sen paco.




LA KANTO
DE L'KERUBOJ

N.B.: La teksto de l'sekvantaj paĝoj
estas nur laŭsence tradukata.



LA LEONO

- Kiu vi estas kerubo ekfluganta al ĉiel' ?
- Mi estas Dia leono, mia nomo estas Ariel !
- Kion vi diras, ho leono, kiam tagiĝas,
Kiam, reve, vi esploras
La nebulan misteran Orienton ?
Ĉu vi ne aŭdas ekstari popolon novnaskitan ?
Ĉu vi ne vidas veni grandan reĝon tute armitan ?
Armita per forteco, sageco kaj boneco ?
Vi starigas al ĉielo vian fortan paciencon,
Via titana beleco egalas vian potencon,
Viaj membroj estas kiel la kolonoj de Herkulo,
Kaj antaŭ via rigardo, retroiras la horizonto.
Viaj flugiloj etendiĝas, fortaj, aŭdaciaj,
Forturnante la minacon en kuraga lukto,
Leona potenco kaj flugiloj de kolombo,
Espera potenco pli forta ol tiu de bombo.
Kion vi diras pri la nokto, orda gardostaranto ?
Ĉu vi ne ankoraŭ vidas ekaperi la fajreron
De potenco kaj fulmobrila aŭroro
De atendita printempo sed kiu tiel malrapide naskiĝas ?
Bone rigardu, leono, bone rigardu tien malproksime
Gravos la tago, kiam vi mire ekkrios:
"Falite ! ĝi falis, Babilono la Granda".
Kaj la vivantoj senkuraĝigitaj, la mortintoj lacaj pro atendado
Ekĝemos ame, en sia retrovita koro.
Aŭdante sonori la fratecan horon.



LA SFINKSO

- Kiu vi estas kerubo, kiu estas via nomo en la Ĉiel' ?
- Mi estas amiko de Dio, mia nomo estas Mikael'
Kaj mia beleco ornamigas per ĉiuj misteroj
De Eolo, Astarto, Cereso kaj Demetero.
Mi ridetis al la homoj por fekundigi iliajn sonĝojn
Kaj ilia spirito ekvekiĝis kiel vento kiu leviĝas.
Je la pruo de ŝipoj, mi kondukis iliajn vojaĝojn.
Tra la rifoj, al malproksimaj bordoj.
Verdire, tra la tuta tero mi vojaĝis,
Mi revis, mi esploris, mi fosis, mi trovis;
Al mi kreskis vent-flugiloj, per aventuroj parfumitaj,
Longaj, maldikaj, kiel veloj tute puraj,
Flugiloj de birdegoj kiujn portas la ventegoj,
Flugiloj de esplorantoj, flugiloj de laroj
Kiuj malvolviĝas, majestaj, en malrapida ritmo,
Flugas kaj psalmokantas kaj etendiĝas kaj faldiĝas,
Samkiel preĝo skribita en la vento.
Mi estis la vualo purpura de la unuaj misteroj
Mi estis lazura vualo, kaj mi ĉirkaŭis la teron

Gvidante Nekao'n, Kolomb'n kaj Magellano 'n,
Sur oraj sulkoj al arĝentaj bordoj,
Mi portis sur miaj flugiloj: Vinci ', Galileo'.
Al aliaj Orientoj, por aliaj ekflugoj
Al ruĝaj destinoj aŭ al strangaj bordoj.
Poste, flugiloj el ŝtalo hardis mian bildon,
Flugiloj de minaco kaj flugiloj de morto
Tro longe makulis la ombron de mia ekflugo.

... ..

La kvieteco, sub ĉieloj sen idoloj, revenos
Kaj mi donos al poeto, por ke li flugu
Kun sia tuta ardeco, dum lumaj tagoj,
La flugilojn blankajn, novajn, fortajn pro l'Amo
Por malkovri novajn ĉielojn kaj aliajn grundojn,
Ravajn bordojn de ĉielaj Citeroj...

... ..

Ĥimeroj, konduku min sur la teron promesitan,
Al la bordoj de l'Utopio leviĝis la brizo,
Ĉiuj veloj streĉitaj kiel karavelo,
Ke trapasu ĉiuj ondoj de la novaj genezoj
Sub la steveno roka kun busto bravega,
Staranta antaŭ la vojo de la tuta tero.
Rigardu ho kerubo ĉar ĉio renoviĝas
Antaŭ via dia fronto kaj via rigardo de belulino.



LA VIRBOVO

Kaj vi, virbovo pacienca, maltima, obstina,
Kiu estas via nomo, kiu vi estas do ?
Kun flugiloj disvolvitaj, kerubo protestanta
Nigra, kiel karbisto, post tago finita
Fiera, kaj kiu, ekvidante la ruĝan signon,
Kuras forverŝi sian sangon por ke la destino ekmovu,
Kaj por ke la Nuno havu kantantajn morgaŭojn
Kaj ke la Pasinteco forkuru kiel fibesto.

... ..

Mi estas la geŭzo, ĉiam luktante: Israel'
De post jarcentoj, eterna eksterlegulo
Geŭzo de la maro kaj geŭzo de la tero, aŭ
geŭzo de l'ĉiel'

Kaj geŭzo el ŝtono, nun, por la vekigo;
Valdano, Ĵakvo, sorĉisto, cigano, anabaptisto,
Pacifisto blekanta, aŭ kriptokomunista,
Mi estas tiu, de kies vizaĝo oni sin deturnas
Mi estas la homo, marŝanta ekde la praepokoj.

... ..

Ili bone amis siajn arbarojn, siajn ebenaĵojn, siajn valojn,
Kaj ili amis la varman kvietecan de la vesperkunveno
Ĉar estas bone vivi laborante laŭ plaĉo,
Ĉar estas bone vivi libera, sen rankoro,
Kaj estas agrable resti kie kreskas sia herbo;
Starantaj sur la sulko sen retroiri unu paŝon,
Rektaj antaŭ la Cezaroj, rektaj antaŭ la nobeluloj,
Rektaj antaŭ la prelatoj, rektaj antaŭ la imperiestro,
Rektaj antaŭ la punbrulejo kaj rektaj antaŭ la rado,
Sen retroiri unu paŝon, kaj sen grimaco,
Antaŭ iu ajn, sen fleksi la genuon,
Kaj sen timi la morton, ili rekte falis.

... ..

Poste, aliaj, sen afekto
Por teni alte la koron, samekiel flagon
Rezistis, ankaŭ rektaj, kiel la kutimo
(Oni al tio al kutimiĝas samekiel al sklaveco)
Ilia nobleco estas antikva kaj ilia raso fekunda.
Ilia plugilo fosis sur ĉiuj lokoj de l'mondo
Ilia blazono estas koro kaj sango en la vejnoj
Por pensi sen ordono kaj daŭrigi dum la peno
Kaj porti peze kaj marsi rekte
Malgraŭ la ordo instalita, la ordo krucforma,
Malgraŭ ke tio estis, malgraŭ ke tio estas:
Ungegoj de pastroj, dentoj de reĝoj,
Katenoj de juĝistoj, rigorecoj de leĝoj
Alarmsonoradoj; kaj tedeumoj, sankta spado de kredo,
Sankta Inkvizicio, sankta leĝo, kruco sankta,
Sankta milito, sankta sango, sur la plebo terurata;
Kaj la Historio, venkita, ĉiufoje submetita
Alkutimiĝas laŭdezire: la forteco kreas la rajton.

Ĉiuj, kiuj mensogis, ĉiuj, kiuj detruis
Mortigis la virbovon, ili ne ĝin venkis.
Kaj la nigra geŭzo, sen alia leĝo ol sia naturo
Kaj sen al kutimiĝi al iu ajn senhonorigo
Alfrontas ĉiam sen antaŭplano, ĉiam antaŭe,
Raso ĉiam ribelanta kontraŭ la rasoj tiranaj

... ..

Kiuj estas konvinkitaj, kiuj estas satigataj,
Tiuj predikas la leĝan ordon kaj la sanktan obeemon
La liturgion el silko por la meso el ŝtalo,
La Krucmiliton kirasitan elirante el la sankt-akvujo,
Kaj la Militon, superega kulto de la tiranoj,
Ili havas heroan rigardon kaj fieran faŭkon
Por paroli pri Bataloj je nomo de la tombejoj.
La geŭzo ridas pri ilia kapo ornamita per krono, aŭ ĉapelo,
Per kasko, mitro, la geŭzo priridas iliajn ornamaĉojn,
La geŭzo senĝene primokus, ja, eĉ Dion mem,
Se okazus ke ĝi partoprenu la senĉesan rediraĉon.
La geŭzo estas kiel roko kiun oni ne povas ektajli.
Kiam "Libereco" havas orajn galonojn
Kaj kepon por laŭlinie ordigi, la geŭzo preferas sin gardi.
Li pensas, do, li konas ĉion, kiu lin koncernas
Kaj estas malfacile lin envicigi
Por la masakro aŭ por la procesiado.
Sklaveco estas forlasita, oni diras, sed la majstro, ne.
La vizaĝo de la vortoj ŝanĝiĝis, sed la mortigo, ne.

Ĉe manko de ĉenoj, oni uzas gazetojn,
Kaj se la piedoj estas liberaj, oni enkatenigas la kapojn.
Oni ne skribas la historion, sin kontentigante per vantaj paroloj
Nepras ke la homo vivu: la homo, ne la roboto.
Tiuĵ, kiuj dishakis la pendumilon; rompis la mort-hakilon
Kiuĵ neniam malplenumis grandan taskon
Tiuĵ havas kvazaŭ gravuritan vorton sur siaj bronzecaj genuoj
Kaj sur sia fronto el granito, kaj sur siaj piedoj kaj sur siaj manoj.
Kion ili gravuris, kelkfoje, dum sia lasta nokto
En sia karcerio, por atestigi la ŝtonojn,
Tiu vorto, kiu ankoraŭ tondras je la limboj de l'Pasinteco,
Vorto de tiuĵ, kiuj neniam fleksis la genuon:

Rezistu !

Tiu vorto donis al ni la homajn liberecojn
Per sango, per ŝtalo, per fajro, per la ĉenoj,
Milfoje kontestita, milfoje elacētita
Milfoje nuligita kaj milfoje pagita
De la popolo vundita, al hipokritaj nobeloj
La libereco, antaŭ notario, rajtis konsiderojn.
Per aĉa inko, fakte, la ĉarto estis subskribita.
Kaj nun, kiam ĝi estas dufoje registrita,
Kiam tro da sango, da larmoj, kvitancis la sumojn
Necesas, finfine memori la Homajn Rajtojn

... ..

Pro la promeso, kaj la Di-favoro
Pro la deziresprimo de la Tero kaj pro la fronto de la geŭzo
Libereco homa estas libereco superpotenca.
Rezistu, virbovo, hontega estu tiu, kiu malbonon restarigas
Rezistu, maljuna laboristo, la destino vin liberigas
Historio estas sanktigita pro ĉiuj viaj mizeroj.

... ..

Gamboj nervaj, dorso potenca kaj fronto el ŝtono,
Liberecaj flugiloj de maljuna tetrao
Firma je sia laboro kaj firma je sia destino,
Geŭzo, vi meritis esti granda kerubo.

LA AGLO



- Kaj vi, aglo laca pro multnombraj bataloj,
Aglo, kun ŝtala rigardo, vestita per mitrajlaj plumoj,
Kun aspekto senpluma de heraldikaj agloj
Emblemo kutima de la teŭtonaj hordoj...
- Mi nomiĝas Ananke, Siva aŭ Azazel'.
Mi detruas materion kaj refaras ĉielon.
Mia forto celas detruĵojn kaj faligi kaj mortigi,
Ankaŭ fosi la sulkon por prisemadi.
Mi estas armeestro kaj Sinjoro de l'balaloj,
Miaj virtoj estas sangaj, miaj venkoj estas elventrigaj,
Mia amo estas el fero, mia saĝeco estas demenco,
Mi ĉion ekstermas por ke ĉio rekomencu...
Kaj se tiele estas, honto al potenculoj, al reĝoj,
Hontindaj instrumentoj...
Kaj tiam, honto al mi !
Kaj ke, finfine, la Justulo postulu de mi klarigojn
Kie estas tiu justulo, ĉu li ekzistas ... ?
Ho honto !
Ĉu de tiu infera ludo ili plezuron ricevu ?
Trinkante tiom da sango, ĉu ili ne naŭzas ?
Ho, homoj, revenu el via blindeco;
Vi mortigis, jes, sed post komandado.
Kaj tiun komandadon mi ordonis.
Nun, estas finite ! Estas finite. Komprenu:
Estas ordono nepra de la Sinjoro de l'bataloj,
La Milito dekretis siajn proprajn entombigojn
Venis la tempo por alie pensi,
Por la dioj, la homoj, kaj eĉ por Satano.

Disde la kvar turoj de limŝtono de l'mondo,
Kiel kvar gigantoj kontrolantaj la mondon,
Ekkriu al Dio, kriu je tiu horo de l'mondo,
La reston de espero, lasta sopiro de l'mondo.

... ..

Tra la kvar horizontoj limigantaj la mondon,
Kaj per la kvar ventoj kiuj ĝin movigas
Kaj per la kvar najloj kiuj alnajlis la mondon,
Sur ĉiuj kampoj de mortintoj je la kvar anguloj de l'mondo,
Per la kvar profetoj kiuj diris al la mondo,
Ke la Espero estas Dio kaj ke la Homo vivu,
Ke la Tartaro estingiĝos kaj floros...
Kiam la Espero mortiĝas kaj ke ruiniĝas la mondo,
Ke per viaj kvar deziresprimoj restariĝu la mondo.

... ..

Kiam la Ĥaoso rebatas al Tumulto: -Nenio-.
Starantaj je la kvar ventoj, kvarfoje diru, -Venu-.
Al la Majstro de la Tero, Ĉieloj kaj Ondoj.
Laŭ la deziresprimo de la Tero, polvo de l'Mondo
Kaj laŭ la deziresprimo de l'homo, ĉelo de l'mondo...

Post 30 jaroj, en Eben-Ezer, tro rapide forpasitaj por pensi kaj krei novajn verkojn, laŭ ni estis utile aldoni tion, kio sekvas, por konfirmi niajn celojn kaj ankaŭ helpi al la homoj kompreni kion ni ĉi-tie faras.

Neniu vorto estas forlasenda el la antaŭa teksto. Tiam ni pensis tiel, kiel hodiaŭ ni pensas. Ni ankaŭ volus forigi el la kapo de la fiscivolemuloj la ideon, ke Eben-Ezer estas kastelo, estas tute la malo kaj estas tiel multe pli bone.

Do, ni reasertas tion, kion ni antaŭe diris

Eben-Ezer estas limŝtono
Eben-Ezer estas fortikaĵo
Eben-Ezer estas templo
Eben-Ezer estas demonstracio
Eben-Ezer estas lernejo
Eben-Ezer estas arto
Eben-Ezer estas profetaĵo

Estas **limŝtono** ĉar ĝi estis starigata fine de la jaro 1963-a por saluti la aŭroron de la milenio. Limŝtono, ĉar ĝi apartigas la perfortajn tempojn disde la Juĝo-tempoj, kaj la sklavajn tempojn disde la espero-tempoj.

Estas **fortikaĵo** ĉar ĝi rezistis al ĉiuj atakoj, la noblaj kaj la malnoblaj. Ĝi posedas armilojn, kiuj sen disverŝado de senkulpula sango, akre kritikis la orgojlon de la ĉefkulpuloj kaj nudigas Stultecon kaj Hipokritecon. La plej efikaj armiloj kontraŭ Perforto estas la veroj. Ili ne mankas al ni kaj estas pli efikaj ol la raketoj.

Estas **Templo** kiu ekstere, samvaloras alian. Sed, interne, ĝi superas ilin ĉiujn, ĉar ĝi estas tiu de la tuta Homaro, de milionoj da jaroj ĝis en la spirito de la misteraj estontaĵoj. Estas templo de la Destino. Ĝi mezuras la eternajn tagojn laŭflue de la cirkonstancoj. Estas la templo de la profetoj, kiu komprenas ilian lingvaĵon kaj revelacias ĝin al la homoj. Estas la templo de la Revelacio, ĝi tie estas entute raportata, desur la montara bazo ĝis la pinto de la kerubaj flugiloj.

Estas ankaŭ **demonstracio**. Ni brilege pruvadis nian pacifismon per amo, pensado kaj agado. Neniu horo estis perdita por la homaro. Inter ĉiuj manifestacioj kontraŭ la aktualaj milit-krimuloj kaj kontraŭ la paĉaj krimuloj, Eben-Ezer estas la sola banderolo kiu postvivos la margauon. Eben-Ezer estas vigla elmonro de aktiva vivo en esplorado de la Kono. Ni ne limigas nin denunci la homan Stultecon; per niaj agadoj ni demonstracias, ke estas tro malmulte da homoj okupataj al **vera laboro** por la morala renovigo de la planedo kaj por la reintegrigo de la homoj en sia eterna rolo.

Estas **lernejo**, libera lernejo sed certe ne katolika.
Ĝi estas ankaŭ kontraŭklerikala do ne subvenciata, kaj nepolitika, do ne
envicigata, kaj kontraŭmilita, do ne agnoskita.

Kaj ĝi instruas.

Lau siaj etetaj rimedoj ĝi instruas verojn.

Niaj verkoj: **Origino de l'Kavernoj**
Revelacio de la Prapopolo
La Apokalipsoj
La Similecoj
La Enigmoj de Pach-Lowe datumos

Ĉefe la 6 volumoj de **Heptamerono**, enciklopedio de la Historio, kaj la
ĵus eldonita: **Filozofio de homa Genro**, estas nekompareblaj verkoj laŭ
la filozofoj kaj la historiistoj.

Ĉi-tio konsistas el nepereebbla monumento de konoj, eligita el niaj
muroj sen iu ajn helpo kaj spite de multaj opozicioj.

Niaj prifosaĵoj, niaj studadoj, de pli ol duona jarcento igas la
Silikan Muzeon, eble la nura loko kie la ĉefaj problemoj pri Geologio,
Paleontologio, Arkeologio kaj Historio estas studataj pli filozofcele
ol profitodone. Nia instruado estas pli ol mesaĝo; ĝi estas atestilo.
Nepraĵo.

Eben-Ezer estas **arto**. La artistoj, la pensuloj, la poetoj pridisponas,
en la programoj de l'Destino, potencon kies grandegan influon ili ne
prikonscias. Ni taŭge disponas pri ili; tio estas nia nura referenco.
Ni invitas ĉiujn pensulojn kaj ĉiujn artistojn ne plu sin prostitui por
la Diabla salajro. La mezboneco sufiĉe daŭris.

Eben-Ezer estas **profetaĵo**. Tio estas la Apokalipsa libro tradukita en
ŝtonoj, en formoj, en surfacoj, en volumoj por tiu, kiu penas pripensi.
Tio estas profetaĵo plenumita de la jaro I-a de la milenio. Tio estas
profetaĵo kiu, retroire, rivelas pasintecan kiu malantaŭenigas la
originon de la vivo ĝis la eternecaj cikloj de l'Universo. Tiuj
eternecaj cikloj, tiuj universalaj leĝoj estas profetaĵo mezurata
samkiel majesta simfonio. Ilin ni klare tradukis.

De kie ni venas ? - Ni povas tion scii.

Kiuj ni estas ? - Ni devus tion scii.

Kien ni iras ? - Ni iras al la destinoj.

Kaj la dioj de la Destino lumigas nian vojon.

En la tempo de Levjatanoj, kiam ŝanĝiĝis la vizaĝo de la ĉielo kaj de la tero
Tiu, kies origino devenas el la eternaj tagoj
Tie estis la Homo.

En la tempo kiam la tero ŝiriĝadis, kiam la maroj forfluadis
En la tempo de la ektimego, je la tempo de l'ekteruro
Tie estis la Homo.

En la tempo de la vintroj senfinaj kaj de la kotaj diluvoj,
en la tempo de Behemoto
Tie estis la Homo.

En la tempo por fosi la teron kaj al ĝi konfidi la ĝermon
Por la gren- kaj vinber- rikoltoj
Sur la tuta tero, unu apud la alia kun la filoj de Dio
Tie estis la Homo.

En la tempo de laboro sur la tero, kaj sub la tero
En la tempo por esplori, pensi, scii, en la tempo por esperi en la suferado
Tie estis la Homo.

En la tempo de la Nacioj kaj de ilia karnavalo
En la tempo de l'sango, de la larmoj kaj de la ĉenoj
En la tempo de l'oro, de l'incenso, de l'ŝtalo, de l'petrolo
En la tempo de monstraj mort-maŝinoj
Konsekrante la apoteozon de l'Stulteco
Tie estis la Homo.

Por ke ĝi vidu per siaj okuloj, ke ĝi komprenu per sia koro, ke ĝi renoviĝu
Por morgau.

*

EBEN-EZER...



*...ESTAS
LIMŠTONO!*